

5

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

M A J O 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * Al pli alta lingva nivelo	1
* * Regularo de la ekzamenoj	3
* * Programo de la ekzamenoj	4
Ada. Du signifoplenaj faktoj	6
S. Válova. III tutlanda Esp.-junulara balo en Ruse	6
D-ro N. Donev. Trankviligiloj	8
* * Medicinistaj informoj	8
Ada. Sepa leciono	10
M. Isaev. Bulgario (versaĵo)	12
S. Novik. Kanto de junaj esperantistoj	13
* * TRA LA MONDO	14
* * ORGANIZA VIVO	14
M. Conkovski. Jarkunveno de Bulg. Esp. Kooperativo	16

Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm²; korespondanoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Paĝova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Jvan Palkin, Mitnaja ul. 52/54-kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



AL PLI ALTA LINGVA NIVELO!

La bulgara Esperanto-movado dum la lastaj jaroj akiris gravajn sukcesojn. Ĝi plifortiĝis kaj amasiĝis. La nombro de la societoj plikreskis. La amasa vizito (de pli ol 1600 personoj) al la junulara balo dum la pasinta monato en Ruse estas elokventa signo pri la impeta supreniro de la enlanda movado. Sed nun ekstaras la demando pri la kvalito. Ĉu ĝi estas kontentiga? En la oratora konkurso ĉi-jare partoprenis pli da ĝejnuloj. Tio estas tre ĝojiga. Tio signifas, ke la junularo turnas jam sian atenton al la lingva perfektigo. Sed ĝenerale, kun tre malgrandaj esceptoj, la lingva nivelo estis malalta. Kaj tio vere reflektas la ĝeneralan lingvan nivelon de nia esperantistaro.

Antaŭ ni staras gravaj eventoj: la 35-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Burgas kaj la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio. La bulgaraj esperantistoj amase senpere kontaktiĝos kun multaj esperantistoj el la tuta mondo. Tiuj faktoj ankoraŭ pli, kiel neniam antaŭe, starigas antaŭ ni la taskon lerni diligente kaj strebi sisteme al perfekta ekrego de la lingvo.

Pri la suprenigo de la lingva nivelo de la esperantistoj BEA organizas lastatempe iujn aranĝojn (la kursojn en Drujevo, ekzamenojn, pritrahitojn de lingvaj demandoj sur la paĝoj de BE). La societoj aranĝas kursojn por progresintoj, rondojn k. a. Sed nia tiurilata agado ankoraŭ estas tre nekontentiga, kun multaj mankoj.

La problemoj pri la lingva nivelo estas intime ligita kun la problemoj pri preparo de bonaj, kvalifikitaj Esperanto-lektoroj. La unua kurso tiurilata en Drujevo povas servi kiel bazo por plua perfektigo de tiu grava laboro.

En tiu ĉi numero ni publikigas la regularon kaj la programojn de la ekzamenoj „I“ kaj la ekzamenoj „L“. La ŝanĝoj celas la diferencigon de la ekzamenoj „I“. Ne ĉiu bona esperantisto povas esti bona lektoro. Por sin prezenti al ekzameno pri instru-kapablo jam estos necesa antaŭa posedo de diplomo por supera kono de la lingvo. La ĝisnunaj ekzamenoj en Varna, Tŕrnovo kaj Drujevo ne pasis je sufiĉe alta nivelo. Iuj gekamaradoj sin prezentas kun malgrandaj scioj, sed kun granda pretendemo. La komisionoj foje cedas al la malutila memfido de tiaj esperantistoj kaj nemiritite donas diplomon. La taskoj, kiujn starigas antaŭ ni la nuna momento, necesigas pli da severeco en la pritakso de la scioj de la ekzamenatoj. Se ĉiu ekzamenato ricevas diplomon, la ekzamenoj perdos sian signifon, kiel stimulo por plialtigo de la lingva nivelo. En la okazinta antaŭ ne longe plenkunveno de la CK de BEA oni montris ekzemplojn de malbona, eĉ malklera gvidado de kursoj. Efektive, granda parto de niaj kursoj estas gvidataj bedaŭrinde sube de la elementaj postuloj de la pedagogia scienco. Tion ni ne povos tuj eviti. Ja la dezirantoj lerni Esperanton estas tre multaj kaj niaj pretaj lektoroj—

- — Cvenjo, iru en la kuirejon. . .
Tiu ne estas avo frosto. . .

Kiam la pordo de la kuirejo ekfermiĝis, Irina ekparolis:

— Vi venis, denove vi revenis ĉe ni, sed jam estas malfrue. . . vi mem vidas — eĉ la infano ne konas vin. . .
Ŝi ekglutis, ŝajne ŝi volis liberigi de la ekbolinta en ĝia brusto ĉagreno.
— Kiam mi estis juna, kiam la infano estis malgranda, vi forlasis nin. . . nun ni ne bezonas vin. . . Vi jam estas fremda al ni homo. . .

Irina eksilentis. Boris klinis kapon, kaj en lia animo — furiozis ventego.

Kion diri al ŝi, kiel sinpravigi, konsciante ke ŝi estas prava.

— Se vi povas, Irina, pardonu min. . .
— Iru sur la vojo, kiun vi mem elektis! . . .

Kaj Irina fermis la pordon.

Boris Ganev staris sekundon sur la ŝtuparo, poste li turnis sin, ekmarŝis malrapide, eliris sur la strato kaj aliris la stacidomon. De tempo al tempo li ekhaltis, turnadis sin malantaŭen kaj ekrigardadis la lumigintan urbon. . .

Kaj dum tiu ĉi nokto en ĉiu domo estis ĝojo.

Dimo TRUDOLJUBOV

MELPOMENA FRAPETIS. . .

(Rememoro)

Jes, Melpomena frapetis sur la pordon, sed ne eniris. . .

Tio estis en 1923. Kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Târnovo. En la programo de la kongreso — ankaŭ vesperfesto. Kaj en la programo de la vesperfesto, kiel lasta punkto de la literaturmuzika parto, antaŭ la dancoj — teatraĵeto, ludota de amatoroj — kongresanoj. Vidi teatran prezentadon en Esperanto — nu, kian ajn! — aŭskulti ĝue Esperanto-parolon el scenejo! Tio estis revo por ni. . . kaj certe por multaj kaj multaj samideanoj en la mondo! Kaj Gunĉo Gunĉev — tiam ankoraŭ gimnaziano kaj fervorega Esperanto-aganto — havis la bonan ideon kaj la grandan kuragon havigi al la bulgaraj esperantistoj tian maloftan feliĉon.

Ni do, malpacience atendas tiun ĉi belan surprizon. Sur la unua linio de la seĝoj sidas mi kune kun la gastoj el Rumanio (H. Fiŝer, A. Ĉe, Tiberio Morariu, Kiŝ, Balaŝ); tie ĉi sidas ankaŭ Georgo Aktargiev, Petro Jordanov kaj

aliaj malnovaj kaj elstaraj Esperanto-pioniroj.

Nia samideanino Zora Mladenova el Varna, kiu estis unu el la geaktoroj, proksimiĝas al mi, kaj flustre invitas min veni malantaŭ la scenejon, kie jam pretiĝas la geaktoroj: Gunĉo Gunĉev, Mara Kruŝovska el Pleven, Elisaveta Begajeva el Varna. Oni rapide sciigas al mi seriozan peton: la rolo de Gunĉo Gunĉev postulas, ke li ludu en oficiala nigra vesto kaj lia kostumo ne konvenas; mi mem portas nigran jaketon kaj. . . vi komprenas: mi devas demeti mian jaketon kaj prunti ĝin al Ĉunĉo, interŝange surmeti lian jakon kaj reveni en la salonon. Mi hezitas: neoportune, diablo ĝin prenu! Kiel mi veninte en oficiala vesto en la salonon, revenos kaj eksidos denove apud la rumanaĵoj alivestite! Sed. . . la arto ja postulas oferojn! Mi venkas la heziton, la interŝango de vestoj fariĝas.

Mi denove sidas sur mia loko. . . en la jako de Gunĉo. Ĉu iu rimarkis la metamorfozon! Niaj okuloj estas streĉe-

direktitaj al la kurteno, kiu levigas. Sur la scenejo estas Zora Mladenova. Ŝi movas sin de memblo al memblo, purigas ilin je polvo per ia viŝtuko kaj monologas. Ni komprenas: ŝi estas servistino en tiu domo, ŝi aludas pri la dommastrino. Kredeble la lasta estas tuj aperonta. Sed Zora elparolas sian rolon, daŭrigas viŝi la memblojn, iujn el ili jam revişas duan kaj trian fojon, sed neniu envenas. Tio ĉi daŭras longete kaj ni vidas, ke la aktorino venas en la konfuzon. Konfuzon sentas ankaŭ ni. Kio okazas? Io ne estas en ordo. Ĉu nur la ĝisnunaj paroloj de Zora Mladenova elĉerpas la teatraĵon? Pasas ankoraŭ kelkaj dolore turmentaj momentoj. Zora eliras el la scenejo malantaŭ la kulisojn. La scenejo restas malplena. La malkompreno kaj la konfuzo de la publiko kreskas. Ne, tiu situacio estas netolerebla! Mi rapidas malantaŭ la scenejon kaj trovas la ge-aktojn grupiĝintaj kaj en ekscita interparolo. Ĉiuj estas ĉirkaŭ Elisaveta Begaĵeva, kiu faras senesperan mienon kaj similas spiteman infaneton, ripe- tante nur: „Mi ne povas, ne povas, ne povas! „Ne estis bezone, ke oni kla- rigu al mi la situacion. Mi mem kom- prenis: Begaĵeva devis ludi la rolon

de la dommastrino, sed en la momento, kiam ŝi devis eniri la scenejon, ŝi su- bite rifuzis; ĉu ŝi ektimis, ĉu io alia ekĝenis ŝin? Sed — la stato estis ne- solvebla. Vane Gunĉo uzis ĉiujn pers- vadrimedojn, vane li koleris, admonis. Vane ankaŭ mi provis konvinki la ob- stinan artistinon savi nin el tiu nepor- tebla situacio. Mara Krušovska indigne rigardis: ŝi estis jam elĉerpinta ĉiujn argumentojn sensukcese...

Tio daŭris mallongajn momentojn. Mi tuj ordonis ke oni mallevu la kur- tenon. Iu aperis antaŭ la publikon kaj anoncis, ke la dancoj tuj komenciĝos.

Jen mi estas denove en la salono... en mia propra jaketo.

La sekvintaj dancoj forviŝis kaj bal- daŭ forgesigis la malagrablan elreviĝon pri la nefarita prezentado.

Do, Melpomena frapetis tiam la por- don de la Esperanto-teatro, sed ne eniris. Ja ŝi estas Muzo de la Tragedio (kvankam oni — kaj mi en tiu nom- bro — malprave konsideras ŝin Muzo de la Teatroludo ĝenerale), ŝi ekflaris, ke sur la teatra scenejo en Târnovo estos ne tragedio, sed komedio, kaj ŝi rapidis foriri.

Kaj... Komedio ĝi estis, vere.

ADA

NI FINKONSTRUU LA MONTODOMON „ESPERANTO“

Unu el la ĉefaj taskoj de la bulgara esperantistaro estas finkonstrui kaj utiligi la montodomon „Esperanto“. La Konstrua Komitato faras ĉion eblan por urĝigi la laboron. Ĝis nun cento da geesperantistoj per laboro helpis la konstru- adon. Inter ili ankaŭ estis eksterlandaj samcelanoj, kiuj vizitis nian landon. Ĉiuj el ili estis ravitaj de la konvena kaj bela loko, kie oni konstruas la montodomon. Kelkaj dekoj da geesperantistoj kontribuis ankaŭ per mono. Iuj societoj ankaŭ monferis. Sed por rapida daŭrigo de la laboro necesas pli amasa monhelpo. Grandan komprenemon ni renkontis ĉe la estraro de la Studenta Esperanto-Societo „V. Peeva“. Kvankam novefondita, ankoraŭ malriĉa kaj havanta nur kelkajn dekojn da membroj ili jam donis 20 levojn.

Lastatempe malavaran donacon ni ricevis de k-do Ivan Canev. Li donis por la montodomo 20 levojn. La fervora kursgvidanto Mihail Langov, kiu pasintjare donis 40 levojn nun deklaris, ke li gvidos esperanto-kurson kaj la ricevontan ho- noraron li disponigos al la Konstrua Komitato. Ni gratulas la oferemon de la supremenciitaj esperantistoj.

La Konstrua Komitato esperas ke ĝi povus publikigi en la sekvonta numero de la revuo la nomojn de multaj novaj donacintoj.

LA KONSTRUA KOMITATO

malmultaj. Nia celo devas esti: post du-tri jaroj ĉiu societo havu almenaŭ unu kvalifikitan lektoron, la grandaj societoj — pli. Tion ni ne povas atingi nur per la centraj arangoj. La societoj ankaŭ devas helpi per siaj rimedoj al la junaj lektoroj. Tiurilate gravan rolon povas ludi la profesiaj instruistoj.

Ni ĉiam pli kaj pli enpenetras en la lernejojn. Estas jam okazoj, kiam al la lektoroj oni postulas dokumenton por rajto instrui Esperanton. Senmerita diplomo kompromitis nian aferon. Jen kroma kaŭzo por pli granda severeco fare de la komisionoj.

La bona organizo kaj gvidado de la kursoj kaj pliaj lernaj arangoj estas grava kondiĉo por kreo de novaj bonaj esperantistoj. Sed ĝi ne estas la nura maniero. Multaj malnovaj kaj perfektaj esperantistoj lernis la lingvon aŭtodidakte. La memlernado kaj la sistema legado donas plej bonajn rezultojn. Jen pro kio ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj aboni kaj regule legi nian organon „Bulgara Esperantisto“, kiu entenas tre variajn materialojn. Sed ekzistas ankoraŭ estraroj kiuj subtakas ĝian signifon kaj ne varbas abonantojn. Tiumaniere ili malhelpas kiel la informigon de niaj membroj, tiel ankaŭ la kreskon de ties lingva nivelo. La asocio abonigas la bulgarajn esperantistojn ankaŭ al la internaciaj gazetoj „Paco“, „Internacia jurnalist“, „El Popola Ĉinio“. Aperis multaj bulgaraj libroj en Esperanto. En la magazenoj de la esperanta kooperativo troviĝas ankaŭ eksterlandaj esperantaj libroj. Unuvorte, ni havas ĉiujn eblojn legi esperantan literaturon kaj perfektigi en la lingvo.

La internacia korespondado ankaŭ multon kontribuas al la lingva perfektigo. Estas fakto, ke plej bonaj esperantistoj estas tiuj, kiuj havas grandan internacian korespondadon.

Konsiderante la ankoraŭa manko de vortaroj la societoj devas organizi semajnajn konsultojn, dum kiuj la plej spertaj esperantistoj deĵoros kaj donos klarigojn al la interesiĝantaj esperantistoj pri diversaj vortoj kaj esprimoj, aŭ gramatikajtoj.

Tre multaj kaj variaj estas la formoj de la lingva klerigo kaj memklerigo. Ni ne povas ilin elĉerpi en unu artikolo. La societoj devas okupiĝi pri tiu demando kaj atentigi la membraron pri la graveco de la problemoj, instigante kaj kuraĝigante ilin al tiurilata aktiveco.

Neniam ni havis por tio pli favoran cirkonstancaron, ol nun. Nia tasko estu: ĝis la 48 Universala Kongreso en Sofio ni plialtigu konsiderinde la lingvan nivelon de la bulgaraj esperantistoj.

ПЛЕНУМ НА ЦЕНТРАЛНИЯ КОМИТЕТ НА БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ

На 25 март 1962 г. в София се състоя пленум на ЦК на БЕС, в който участваха членове на ЦК от София и провинцията, както и членове на ръководствата на софийските есперантски дружества. Пленумът изслуша докладите на председателя на съюза Христо Горов за дейността на Българския есперантски съюз и на организационния секретар Виолин Олянов за организационното състояние на съюза.

В изказванията беше критично анализирана цялостната работа на съюза, като по-специално се засегнаха въпросите за идеологическата и въз-

питателна работа, за международното кореспондиране и пропагандата, особено във връзка с предстоящия международен конгрес, за учебната работа и учебните помагала, за съюзния орган, съюзната канцелария и др.

В резултат на разискванията, за подобряване на работата на съюза пленумът

РЕШИ:

1. В чест на 8-я конгрес на БКП и на 35-ия конгрес на БЕС в Бургас да се активизира дейността на есперантските дружества, като участват активно в съревнованието чрез привличане на нови предимно млади кадри, чрез редовно изпращане на членския внос, набиране абонати за съюзния орган, засилване на международното кореспондиране и неговото редовно и навременно отразяване в съюзния орган, в централния и местен печат.

2. Съюзното ръководство да подобри още повече стила и метода на своята работа, като в своята дейност винаги прилага ленинските принципи, като си служи с колективния метод на работа и като създава все по-тесен контакт с дружествата.

3. За идеологическото възпитание на есперантистите и за провеждането на широка културно-просветна работа, бюрото да разработи и да изпрати в най-скоро време до дружествата и останалите оповестени доклади: „Проблемът за международен език и Есперанто“, „Международният език и мирното съвместно съществуване“, „Работническо есперантско движение“, „Есперанто в художествената литература“ и др.

4. Българските есперантисти още по-активно да се включат във всенародното движение за изпълнение и признание на народостопанския план и в движението за ново комунистическо отношение към труда.

5. За още по-голямо подобрене на международното кореспондиране отделът при ЦК на БЕС да набележи нови и конкретни мероприятия.

6. Съюзният орган да печата интересни материали, които да подпомагат политическото издигане на есперантистите, както и статии за участието им в изпълнението на народостопанския план. Да се привличат нови и млади сътрудници, като се подпомагат в тяхната квалификация.

7. Да се засили всемерно участието на есперантистите в комитетите за мир в цялата страна.

8. Да се положат усилия за създаването на по-тесен контакт между съюза и Комитета за приятелство и културни връзки с чужбина за разпространяването на неговите издания на есперанто и за издаване на нови такива. и с Търговската палата за издаване на проспекти и пропагандни материали за нашата страна, във връзка с 48-ия Международен есперантски конгрес в София през 1963 год.

9. Съюзната канцелария да подобри още повече своята работа и да отговаря своевременно на писмата.

10. Съюзното ръководство да следи за доброто съдържание и качеството на есперантските издания и по-специално на есперантските учебници.

REGULARO

de la ekzamenoj pri supera lingvo-kono kaj pri instru-kapablo

1. La kresko de la Esperanto-movado dum la lastaj jaroj necesigas la reguligon kaj la legigon de la lingvo-kono en Esperanto kaj de la instru-kapablo. Precipe oni devas plialtigi la nivelon de la instruado de Esperanto. Jen pro kio oni starigas du specojn de ekzamenoj: a) pri supera lingvo-kono (ekzameno „L“); b) pri instru-kapablo (ekzameno „I“).

2. Al ekzameno povas sin prezenti ĉiu regula membro de BEA. La kandidatoj por instruantoj devas prezenti ankaŭ diplomon pri supera lingvo-kono.

3. La kandidatoj sendas petskribon al la kancelario de BEA kune kun la ekzamentakso minimume 20 tagojn antaŭ la ekzameno. Al la ne allasitaj al ekzameno oni sciigas la kaŭzojn pri la neallaso almenaŭ unu semajnon antaŭ la ekzameno. En tia okazo la takso estas redonata. Se la kandidato mem rifuzos sin prezenti al ekzameno, la takso ne estas redonata.

4. La takso estas: por ekzameno „L“ — 2 levoj, por ekzameno „I“ — 3 lv. La duono de la takso estas distribuata inter la komisionoj kiel hono-

rario, la alia duono restas en la asocia kaso por kovro de aliaj elspezoj por la ekzamenoj.

5. Por ĉiu el la ekzamenoj estas nomata aparta trimembra komisiono. Unu el la membroj estas ties prezidanto. La komisionanoj por la ekzamenoj „I“ devas esti profesiaj instruistoj, aŭ posedantoj de dokumento pri instru-kapablo.

6. La ekzamenoj konsistas el du partoj: a) skriba kaj b) buŝa. La skribaj ekzamenoj daŭras 3—4 horojn (laŭ ĝustigo de la komisiono).

7. La skriba ekzameno „L“ konsistas el: a) traduko el Esperanto en bulgaran lingvon kaj b) traduko el bulgara lingvo en Esperanton. La esperanta teksto estas diktata por kontrolo de la ortografio. La ekzamenatoj povas uzi vortarojn.

8. La skriba ekzameno „I“ konsistas el verkaĵo je libera temo laŭ elekto el tri proponitaj.

Sur la skriba ekzamenajo oni markas la tempon de ties transdono.

9. La buŝaj ekzamenoj efektiviĝas laŭ programo, publikigata de la komisiono almenaŭ du monatojn antaŭ la ekzamenoj. La ekzamenatoj „I“ faras lecion antaŭ ĝelernantoj pri donita temo. Krom la demandoj pri la metodiko de la instruado ili devas respondi ankaŭ al unu demando de la historio de la Esperanto-movado. Al buŝa ekzameno („L“ kaj „I“) povas sin prezenti nur tiuj, kiuj ricevis en la skriba ekzameno noton almenaŭ 4.

La buŝaj ekzamenoj povas esti publikaj laŭ decido de la komisiono.

10. La rezultoj estas pritaksataj laŭ la ĝenerale akceptitaj normoj de ekzamensistemo: malbone (2), nekontentige (3), bone (4), tre bone (5), bonege (6). La ĝenerala ekzamennoto egalas al la meznombro de la notoj de la buŝa kaj de la skriba ekzamenoj.

11. Ekzamenitoj ricevintaj en la ekzameno „L“ noton pli ol 4, ricevas diplomon pri **supera** kono de Esperanto. Tiuj, kiuj ricevis noton de 3 ĝis 4 ricevas diplomon pri **meza** kono de Esperanto.

12. Pri la ekzameno kaj ties rezultoj la komisiono faras **protokolon**, kiun ĝi transdonas al la asocia kancelario.

PROGRAMO

de la ekzamenoj pri supera lingvo-kono (ekzameno „L“)

- | | |
|--|---|
| 1. Alfabeto kaj elparolo. | 17. La gradoj de komparo. |
| 2. Substantivo, adjektivo, nombro. | 18. Sufiksoj -et-, -eg-, -estr-. |
| 3. Personaj pronomoj. | 19. La resenda pronomo (si, resp. sia, sin). |
| 4. Verbo, tempoj, adverbo, formoj. | 20. Prefikso -re-. |
| 5. Prefikso mal-, sufikso -in-. La artikolo. | 21. Sufiksoj -ig-, iĝ-. |
| 6. Prefikso ge-, sufikso -id-. | 22. Sufiksoj -ul-, um-. |
| 7. Posedaj pronomoj. | 23. Sufiksoj -obl-, -on-, -op-, prefikso dis-. |
| 8. Akuzativo, rekta komplemento. | 24. La prepozicioj. |
| 9. Infinitivo de la verbo. | 25. La diversaj specoj de participoj. |
| 10. Sufikso -an-. | 26. Sufiksoj -aj-, -ec-. |
| 11. Sufiksoj -ist-, -il-, -ej-. | 27. Sufiksoj -uj-, -um-. |
| 12. Imperativo kaj kondicionalo de la verbo. | 28. La korelativoj de Zamenhof. |
| 13. Prefikso ek-, sufiksoj -ind-, -ebl-. | 29. Prefiksoj bo-, eks-, pra-. |
| 14. Akuzativo por celpunkto de movo. | 30. Sufiksoj -aĉ-, -ĉj-, -nĵ-. |
| 15. La nombroj. | 31. Sufiksoj -er-, -ing-, -ism-, prefikso mis-. |
| 16. La akuzativo por adverbaj esprimoj. | 32. Novaj afiksoj. |
| | 33. Radiko. Vortfarado en Esperanto. |

PROGRAMO

de la ekzamenoj pri instru-kapablo (ekzameno „I“)

La ekzamenatoj devas respondi, kiel (per kiaj rimedoj kaj ekzemploj) klarigos al la ĝeneralnatoj la sekvantajn demandojn.

I. ALFABETO KAJ ELPAROLO

1. La sonoj h, ĥ, ĝ, ĵ, ĵ, ŭ
2. La akcento

II. GRAMATIKO

3. La esenco de la gramatikaj kategorioj: substantivo, adjektivo, adverbo, verbo.
4. La akuzativo por funkcio de objekto (rekta komplemento)
5. La akuzativo, uzata por esprimi celpunkton de movo.
6. La akuzativo por formado de adverbcaj esprimoj (de tempo, daŭro).
7. La infinitivo.
8. La uzo de la kombino ke . . . u (subjunktivo).
9. La resenda pronomo (si, resp. sia, sin).
10. La a-participoj (la participaj adjektivoj) — aktivaj kaj pasivaj.
11. La o-participoj (participaj substantivoj) — aktivaj kaj pasivaj.
12. La e-participoj (la participaj adverboj) — aktivaj kaj pasivaj.
13. La prepozicioj (laŭ propono de la komisiono).
14. La prepozicio je.
15. La gradoj de komparo (ĉe adjektivoj kaj adverboj).
16. La diferenco inter: kun — per, por — pro, por — pri, dum — tra, apud — ĉe, ambaŭ — la du.
17. La formoj kaj la signifo de voĉoj aktiva, resenda kaj pasiva.

III. AFIKSOJ

18. Aĵo kaj eco (koincido en bulgara lingvo, diferencigo).
19. Igi kaj iĝi.
20. Eĵ, uj, ing (komparo).
21. Ŭm

IV. VORTOJ, VORTFORMADO, PROPOZICIOJ

22. Konstruo de la vorto.
 23. Signifo de la radikoj (vortoj nur de afiksoj kaj finaĵoj).
 24. Konstruo de propozicio, loko de la diversaj propozicioj.
 25. Per kiuj ekzemploj vi atentigos la lernantojn pri la neplena koincido de bulgaraj kaj esperantaj vortoj, kiuj havas nur en certaj okazoj la saman signifon.
- Rimarko.** Kie estas eble, oni devas fari komparon kun bulgara lingvo.

V. ĜENERALAJ DEMANDOJ

26. Kiel vi komencos ĉiun lecionon.
27. Kiel vi kontrolas, ĉu la lernantoj jam posedas la lernitan materialon.
28. Kiel vi okazigos la legadon de nova teksto.
29. Per kiaj rimedoj vi paroligos la lernantojn.
30. Kion vi faros, se vi rimarkos ĉe iu lernanto neĝustan elparolon de vorto.
31. Kion vi faros, se vi rimarkos, ke parto de la kursanoj ne komprenis bone iun regulon.
32. Kion vi faros, se vi rimarkos neĝustan uzon de vorto aŭ neesperantan konstruon de esprimo (propozicio, frazo).
33. En kiu momento kaj kiamaniere vi korektos la erarinton.
34. Kiajn rimedojn vi uzos por vigligi la lernantojn, se vi rimarkos laciĝon en la kurso.
35. Kiamaniere vi ligos la kursanojn kun la loka, enlanda, internacia Esperanto-movado.
36. Kiajn helpilojn por la instruado vi uzos.

VI. HISTORIO KAJ PROBLEMOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

37. Deveno de la ideo pri internacia lingvo.
38. Pri la aŭtoro de Esperanto kaj la unua lernolibro.
39. La unua universala kongreso de Esperanto.
40. La kongresaj paroladoj de Zamenhof.
41. Lingva komitato kaj Akademio de Esperanto.
42. La originala kaj tradukita literaturo de Esperanto.
43. Memorindaj datoj de la bulgara esperanta movado.
44. Esperanto kaj la malgrandaj nacioj.
45. Kial nur Esperanto povas esti vera internacia lingvo.
46. La esperanta stilo.
47. La logikeco de Esperanto.

LITERATURO POR LA EKZAMENO:

1. R. Rakuša. Metodiko de la Esperanto-instruado.
2. Iv. Sarafov. Legolibro por superaj kursoj kaj memklerigo.
3. Kunĉo Vălev, Mihail Langov. Kurso de Esperanto (por progresintoj).
4. Asen Grigorov. Kurso de Esperanto.
5. Ivan Sarafov, Sim. Hesapčiev. Kurso de Esperanto.
6. Ivan Sarafov, St. Masarov. La mondo havas internacian lingvon.

III-a TUTLANDA ESPERANTISTA JUNULARA BALO EN RUSE

„Bonan alvenon en Ruse!“ — grandaj imponaj literoj. Maro de verdaj flagoj kun steloj. La stacidoma laŭparolilo disaŭdigas: „Atenton! Atenton! Al ĉiuj geesperantistoj!“... Ridetantaj gejunuloj kun verdaj steloj sur la brusto, elkore salutas nin en la frua mateno de la 7-a de aprilo. Tiel Ruse renkontis siajn gastojn por la junulara balo.

Kiel grandajn ondojn elŝutas la amason la vagonaroj. Entute pli ol 1600 partoprenis la balon, iuj veturinte centojn da kilometroj. La organizaj aranĝoj estas bonegaj. Ĉiuj alvenintoj estas tuj enloĝigataj.

Vespere. Rapide pleniĝas la vastaj haloj de la Domo de la Sovetoj. Malnovaj konatuloj el pasintaj kongresoj, baloj kaj renkontoj estas denove kune. La prezidanto de la Loka Organiza Komitato — Momĉo Momĉev malfermas la balon ĉe la festaj aplaŭdoj de la ĉeestantoj. Per belaj vortoj la sekretario de BEA Violin Oljanov salutas la gejunulojn kaj emfazas la grandan signifon de la junulara movado. La sveda esperantisto s-ro H. Akselson esprimas sian admiron de la forta E-movado en nia lando. Krome salutas la balon reprezentanto de la Urba Komitato de la Komso-molo. La prezidanto de la junulara sekcio de BEA — Simeon Simeonov substrekas la eksterordinaran gravecon de la lingva perfektigo kiel tasko tre aktuala por la esperantista junularo.

Antaŭ la publiko ekstaras knabineto. Kun mano levita je pionira saluto, per versoj ŝi salutas la junulojn. Por la sekvanta oratoro oni alportas... seĝon. La kvinjara Enĉo Ki-



S-ro H. Akselson el Svedio gratulas la lernantinn D. Ilieva, gajnintan la II-an premion de la oratora konkurso

rilov devas ekstari sur ĝi por atingi la mikrofonon, sed li scipovas Esperanton kaj la publiko renkontas liajn vortojn per ŝtorma aplaŭdego. Kortuŝa momento!

Oni dancas kaj amuzas en tri salonegoj, sub la muziko de tri orkestroj. Muziko, humoro, riĉa estrada programo, vigla dancado, multe da ridado kaj ĝojo ĝis la tria post noktomezo.

La sekvantan tagon okazis la oratora konkurso — trafa rimedo por perfektigo. Sin prezentis sep kandidatoj, precipe novaj esperantistoj. Gajnis denove A. Calâkov el Burgas per elokventa kaj faktoriĉa parolado. La ĵurio, konsistanta el A. Grigorov, R. Triĉkov, Gerasimova kaj V. Oljanov prijuĝis la duan premion al la lernantino Denka Ilieva el Ruse kaj la trian — al Nikolaj Pilev el Varna, studento, tute nova esperantisto. Ĉiuj partoprenintoj ankaŭ ricevis librojn.

En la suna posttagmezo oni organizis per-aŭtobusan ekskurson al la Ponto de la Amikeco kaj al la apudnuba Parko de la Ju-nu-



Denka Ilieva el Ruse, Ljubomir Marinov el Ruse, Anna Prahova kaj Sveĵa Vâlova el Sofio admiras la premiojn de la oratora konkurso

laro. Tie ĉi oni povas agrable pasigi la tempon sur la luliloj aŭ antaŭ la specialaj kurbaj speguloj. Sed nin surprizis alio: subskribo „Aleo Esperanto“. Post konvena ceremonio estis plantitaj ses arboj — ses esperantaj arboj. Tie ankaŭ estis oficiale fermita la III junulara balo.

Vespere la urbanoj denove vidis grandajn grupojn da gejunuloj kaj en la aero sonis

„Vivu Esperanto!“

Al ni estas malagrade disigi de niaj amikoj el Ruse, sed la vagonaro ekmoviĝas kaj la vizaĝoj de niaj afablaj mastroj malaperas en la malproksimo. Elkoran dankon, karaj amikoj, pro la agrable pasigitaj tagoj en Ruse. Ĝis revido en Burgas!

Sveja Válova

DU SIGNIFOPLENAJ FAKTOJ

Mil sescent! — Kiam mi aŭdis tiun nombron mi apenaŭ povis ekkredi.

Tio ĉi estas la nombro de tiuj junaj geesperantistoj el nia lando kiuj anoncis sian partoprenon en la ĉi-jara tradicia balo de la bulgara esperantista junularo. Ĉu en la pasinteco ni povis sonĝi pri tia stato de la movado?

Ĉu nur dancemo altiras tiun multegon da junaj geesperantistoj al la apud-danuba urbo Ruse? — Certe ne. Ja ĉiu el ili povus trovi eblecon kaj okazon danci, eĉ dancegi en sia propra logloko. Sed la stimulo estas: renkontigi kun geamikoj, amuziĝi kun ili, konversacii en Esperanto. La komencantoj, la neperfekte sciantaj la lingvon havas plian okazon fari paŝon al perfektigo. La perfektaj esperantistoj povas partopreni en la oratora konkurso.

Mil sescent! Tio estas fenomenala signo pri la nuna stato de nia enlanda Esperanto-movado.

* * *

En la sama tempo estis rimarkebla alia signifoplena fakto — en alia sfero kaj en alia direkto. La 29-an de marto kolektiĝis je komuna amika vespermango dudeko da esperantistoj — homoj de la scienco: unuj agantaj nun aktive en la movado, aliaj agintaj en la pasinteco. La kolektiĝo havis intiman, neoficialan karakteron, sed ĝia celo estis grava: kontaktigi kaj unuigi la sciencistojn, kiuj estas aŭ estis ligitaj kun Esperanto. Renkontiĝis personoj de eminenta rango: membroj de la Bulgara akademio de la sciencoj, universitataj profesoroj, kunlaborantoj ĉe sciencaj institutoj k. a. Ne mankis surprizaj ekzemploj: „Do, vi ankaŭ estas esperantisto! Ĝis nun ni havis tiel longe interrilatojn en nia scienca laboro, sed mi ne sciis tion!“. Oni faris informojn pri la ĝisnuna utiligo de Esperanto por sciencaj laboroj kaj pri la estontaj eblecoj. La ĉeestantaj membroj de la bulgara „Asocio de la sciencaj laboristoj“ decidis senprokraste formi specialan Esperantan sektion ĉe la nomita asocio. Krome ĉiuj ekdeziris aliĝi al la Internacia scienca asocio esperantista (ISAE). Oni konstatis, ke estas ankoraŭ pluraj esperantistoj-sciencaj laboristoj, kiuj ne povis esti invititaj al tiu renkontiĝo. Certe la rondo plivastiĝos.

Agema, vivoplena, ĝoja kaj entuziasma junularo; klera kaj serioza scienca elito — ĉu ni ne rajtas atendi novan antaŭenpuŝon de Esperanto. Tiuj ĉi du gravaj faktoj povas kaj devas stimuli ankaŭ la trian — plej gravan — parton de la enlanda movado — la lokajn societojn.

La movado marŝas progrese, iras al la kulmina punkto en la historio de la bulgara Esperanto-movado: la 48-a Unversala kongreso de Esperanto en Sofio dum 1963!

Ada

TRANKVILIGILOJ

La medikamentoj de la trankviligo de-longe trovis vastan aplikadon en la medicina praktiko. Per ilia helpo la malagrablaj incitoj perdas sian forton, la ŝtormaj animaj ekscitoj malgrandiĝas, la diversdevenaj doloroj sufo-kiĝas. Ĝuste uzataj, ili kuracas pezajn ner-vajn disfunkciojn (malordigojn), restarigas la normalan dormon kaj al la homo revenas la trankvila kaj agema vivo.

En aparta grupo, konata sub la titolo **sedativa**, delonge estas uzataj la bromaj saloj, skopolamino, valeriano k. a.

La granda terapia utilo de la trankviligaj kuraciloj stimulas la eksplorantojn serĉi di-versajn novajn similajn rimedojn.

Dum la lastaj jaroj oni kreis novan medi-kamentan grupon sub la titolo **trankviligiloj**. Ili estas sintetikaj kuniĝoj, kiujn la nuntempa medicina industrio de la tuta mondo dispok-nigas por trankviliga efiko sur la hiperin-citita centra nerva sistemo. La preparajoj de tiu ĉi grupo estas tre multaj. Pli gravaj el ili estas: aminozin (largaltin, hlompromazin), merazin, hloraclizin, prometazin (fenargan) k. a. Ilia ĉefa eco estas krei artefaritan trankvilon malgraŭ la ĉeesto de minacantaj faktoroj. Sen alkonduko al dormo ili liberigas la homon de la ĉenero de peza anima streĉo kaj maltrankvilo.

La vojo de ilia efiko estas malsimpla. An-taŭ ĉio ili trankviligas la nervajn ĉelojn en la cerba kortiko (ŝelo) kaj la homo, sen perdo de la imago pri la realeco, toleras la doloro-reakcion, la malagrablaĵon kaj la pezon en la vivo, kio okazas al li. La mekanismo de tiu efiko bazas sin sur ŝanĝoj en la kemiismo de la nerva ĉelo.

Tiaspecajn trankviligajn agojn la trankvili-giloj efikas ankaŭ sur la reta formaĵo (for-macio reticularis). Ĝi estas cerba histo situita laŭ la akso de la longforma cerbo (medula oblongata) kaj pli supre de ĝi estas intera centro, trans kiu pasas ĉiuj incitoj kaj direk-tiĝas al la kortiko de la cerbo. La rolo de la reta formaĵo estas malfortigi la streĉecon de ĉi tiuj alvenantaj impulsoj kaj prezenti ilin al la kortikaj ĉeloj per tolerebla forto. Tiu ĉi reta formaĵo plenumas siajn funkciojn sub la reguligaj efikoj de la kortikaj ĉeloj. Kiam tiu ĉi korelacio rompiĝas, ekestas procedoj de incito kaj malsimplaj nervaj disfunkcioj (ma-lordigoj). La trankviligiloj havas trankviligan influon sur la reta formaĵo kaj kune kun la sama influas sur la kortikaj ĉeloj forigante la malsanecan supersentemon.

La efiko de la trankviligiloj etendiĝas an-kaŭ sur la malsanoj de aliaj regionoj. Per ilia helpo oni kuracas: hipertonian (sangtensian) malsanon, ulceran malsanon k. a.

Dum la lastaj jaroj formiĝis ankoraŭ alia grupo de trankviligiloj, kies destino estas malpli ligita kun la kuracado de la apartaj malsanoj. Ĝi estas nomata **kontraŭtima (ata-raktika)**, pro la rezulto de la efiko. Tiaj estas: ataraks, meprobamat, ekvanil, prokalm kaj multaj aliaj. Ili trankviligas la tro ekscititan centran nervan sistemon de reala aŭ nereala timo, kreas staton de indiferenteco, eĉ forpre-nas la kriterion pri ĝenerale akceptitaj mora-laj normoj. La homo trankviligita kaj akceptas sian staton kiel dezirata, kiel bonstato. Tiaj proprecoj faras la menciitajn medikamentojn tre valoraj por provizora uzado ĉe kuracado de iuj nervaj kaj psikaj suferoj. Sed en kel-kaj okcidentaj landoj oni uzas ilin ankaŭ por alia celo. Tie, kie la homoj estas subpremataj pro manko de vivokondiĉoj kaj krucumitaj de streĉoj, oni serĉas rimedojn por forjeti la pe-zan vivan ŝarĝon. La disvastigado de tiaj ri-medoj alportas egajn gajnojn por la firmaoj, kiuj produktas ilin, sed kaŭzas tro grandajn domagojn por la popola sano. De unu flanko la daŭra uzado de tiuj ĉi substancoj veneni-gas la organismon, de alia — deprenas la ho-mojn de la reala historia ekzistado. Estiĝas trankvileco, kiu estas egala al senzorgo kaj forkuro de la vivo. Sub ilia influo oni ne povas racie karakterizi la cirkonstancojn en kiuj ili vivas kaj reagi al ili adekvate.

La sana homo en la socialisma socio ne bezonas tiajn trankviligajn rimedojn. Li estas trankvila antaŭ la pacaj kaj helaj perspektivoj de la komunisma estonteco por kiu li laboras.

D-ro Nikola Donev

Scienca kunlaboranto en la Sciencesplora
Instituto pri Farmakologio
en Sofio

AL ĈIUJ MEDICINISTOJ ESPE-RANTISTOJ EN LA LANDO

Karaj gekamaradoj,

Por la bulgaraj medicinistoj esperantistoj alproksimiĝas du gravaj eventoj: la 35 Bul-gara kongreso de la esperantistoj en urbo Burgas dum la kuranta jaro kaj la 48 Uni-versala Kongreso de Esperanto dum 1963 en Sofio.

La estraro de la Medicina sekcio ĉe BEA turnas la atenton de ĉiuj bulgaraj medicinistoj esperantistoj eklabori pli vigle kaj streĉe — prezenti la utilecon de la internacia lingvo Esperanto en siaj medioj, kie il laboras, por ilia laboro kaj por la paco en la tuta mondo.

organizi kursojn por lernado de Esperanto kaj propagandi kuraĝe kaj digne ĝin.

Ĉiuj grupoj de medicinistoj esperantistoj (grupon devas organizi eĉ 2 medicinistoj esperantistoj, kiuj laboras en unu loĝloko, malsanejo, instituto, entreprenado ktp.) devas ellabori kvarmonatajn planojn por laboro dum 1962 kaj klopodi plenumi ilin.

Nun grava tasko por ĉiu medicinisto esperantisto estas ellerni bone Esperanton. Nur tiel li povos ankaŭ bone propagandi ĝin.

Ĉiuj grupoj kaj apartaj medicinistoj esperantistoj estas petataj kontaktiĝi kun la lokaj societoj, se ekzistas tiaj, kaj kun la Medicina sekcio ĉe BEA.

Ĉiu medicinisto esperantisto devas esti abonanto de nia organiza organo „Bulgara esperantisto“.

Ĉiuj grupoj kaj apartaj medicinistoj esperantistoj estas petataj sendi al la Medicina sekcio:

1. Sian adresojn kaj mallongan raporton pri la laboro dum la pasinta jaro 1961; post la fino de ĉiu kvarmonato oni sendu mallongan raporton;

2. Interesajn artikolojn kaj informojn pri agado kaj medicinaj demandoj — sciencaj kaj sciencopopularaj. Laŭ ebleco estos presataj en nia organo „Bulgara Esperantisto“;

3. Propojn pri la plibonigo de la laboro de la grupoj ktp.

La ricevotaj materialoj servos al ni por ŝanĝo de sperto kaj por la preparo de la raporto de nia sekcio por la 35 kongreso en Burgas. Ĉion sendu al Medicina Sekcio ĉe BEA p. k. 66, Sofio.

Sekretario: **Prezidanto:**
D-ro St. Moraresku **D-ro T. Todorov**

SCIIGOJ

KURSOJ DE ESPERANTO POR MEDICINISTOJ

Ĉe la Sciencesplora Instituto de Kurologio kaj Fizioterapio en Sofio funkcias du kursoj de Esperanto — por progresintoj kaj komencantoj — ilin partoprenas sciencaj kunlaborantoj kaj medicinaj fratinoj. La kursojn gvidas D-ro T. Todorov — supera scienca kunlaboranto ĉe la sama Instituto.

— Je la 27 de februaro k. j. komenciĝis kurso de Esperanto por komencantoj ĉe la Sofia distrikta sanitaroantiepideemia stacio. La kurson partoprenas 25 medicinistoj — kuracistoj, helpkuracistoj, laborantoj kaj oficistoj.

La kurson gvidas D-ro St. Moraresku — ĉefo de sekcio ĉe la sama stacio.

VIGLA GRUPO DE MEDICINISTOJ ESPERANTISTOJ

En Plovdiv de la pasinta jaro laboras tre vigla grupo de medicinistoj esperantistoj ĉe la loka Esperanto-societo „Kulturo“. Estraro: prezidanto — Prof. Ĝalabov, sekretario — Doc. P. Pejčev, respondeculo pri la kulturamasa laboro — Liljana Tonkina.

EL EKSTERLANDO

Sovet-Unio. La Medicina sekcio ĉe BEA ricevas regule la programojn dum ĉiu kvarmonato de la Sekcio de la medicinistoj en Moskvo.

La medicinistoj esperantistoj partoprenas aktive en la laboro de la sekcio per diversaj esperantaj prelegoj kaj informoj. Ili samtempe aranĝas literaturajn vesperkunvenojn kaj vesperkunvenojn de la junaj medicinistoj esperantistoj.

Ofte ili perfektigas en la lerno de Esperanto sub la gvido de Akademiano E. A. Bokarev. En la programoj — junulara „Fajrero“, interŝanĝo de sperto, informado ktp.

Funkcia libro-gazetvendejo, ankaŭ lingvoselsilejo.

Ĉiumerkrede E-renkontiĝoj, E-rondetoj, konversacioj.

La kunvenoj okazas dimanĉe de la 19 ĝis la 22 h. Eksterlanduloj gastoj de Moskvo estas konsiderataj kiel plej afable invitataj.

Adreso: Moskvo, str. Hecen 19, trolebuso: 5, 8, 15, 31; aŭtobuse 107; telefono B — 9—65—92.

RICEVITAJ LIBROJ EL JAPANIO

La Medicina sekcio ricevis la jenajn medicinajn lernolibrojn en Esperanto:

LERNOLIBRO DE OFTALMOLOGIO, de Seiĉi Kato, Prof., d-ro, Direktoro de la Klinikoj de Ŝinŝu Universitato.

NIA KORPO, de Seiho Nishi, d-ro, emerita profesoro de Tokio Universitato. eksrektoro de Gunma Universitato.

La unua estas eldonita de eldonejo Aōsima, Tiba, 1959; la dua — de Gunma Esperanto-societo, Maebaŝi, 1961. (Eksportataj ekskluzive de Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati, Tokio).

NIA INSTRUISTO

Sepa leciono

Nun mi prezentos al vi per kelkaj vortoj ankaŭ tiun, kiu instruas al ni Esperanton.

Lia nomo estas Konstantino Ivanov. Homo 30-jara, mezalta (nek tre alta, nek malalta), nedika, vizaĝo ovala, nazo iom kurba, okuloj brunaj, haroj same brunaj, malgrandaj lipharoj...

Vi certe diros al mi: Kio estas do tio? Ĉu vi verkas ian priskribon por la legitimilo de via instruisto?

Ho, tute ne. Mi simple deziras doni lian fizikan portreton. Mi legis ie, ke tiel oni iam komencis karakterizi personon.

Do, aŭskultu plu. Nia instruisto havas flaman rigardon, energian parolon.

En siaj rilatoj al ni li estas tre delikata. Iufoje li permesas al si diri ian ŝercon, sed neniam li mokas kiun ajn. Ni sentas en lia persono homon bonan, honestan, kulturan kaj tre inteligentan. Profesie li estas gimnazia instruisto de historio. Mi diras: vera instruisto. Kun kia granda pacienco li okupas sin kun iu el la malpli kleraj kursanoj, por klarigi al li iun regulon! Kun iom da ŝercoj, iom da seriozaj ekzemploj li ĉiam sukcesas klarigi plene ĉiun regulon.

Ordinare en la komenco de la leciono li trarigardas la kajerojn de la kursanoj. Ni rimarkas, ke li ne estas kontenta, se ies kajero ne estas en ordo. Tiu, kies kajero estas tia, hontas.

Nia instruisto perfekte posedas Esperanton kaj instruas ĝin kun granda amo. Per tio li influas ankaŭ al ni lerni la lingvon kun amo.

La kurson li gvidas tre lerte kaj la rezultoj de lia laboro estas pli ol kontentigaj. Ili estas bonegaj!

Li konstante sugestas al ni, ke niaj konoj jam estas sufiĉaj por esprimi ordinarnajn pensojn pri aferoj el la ĉiutaga vivo; oni nur devas venki la timon paroli en fremda lingvo. Li rekomendas al ni komenci korespondi kun alilandaj samideanoj.

Proverbo. — „Io“ estas pli bona ol „nenio“.

KORELATIVAJ VORTOJ.

iu io ia ie iam iom iel ial.

Ĉe tiuj vortetoj mankas la komencaj sonoj *k, t, ĉ, nen*. Per ili ni nek demandas, nek montras, nek ĝeneraligas, nek neas. Ili estas nedifinitaj pronomoj, adjektivoj kaj adverboj.

Kies = de kiu; ties; ĉies, nenies.

Kies libro estas tiu ĉi? = De kiu estas tiu ĉi libro?

Al kiu apartenas tiu ĉi libro?

Ĉies libro povas servi al ni, ne nur la via. Ĉies opinio estas valora.

Nenies libro estas pura.

Donu al mi ies libron; ne gravas, kies ĝi estas.

Sistemo de la korelativaj vortoj:

Bazo nedifinita: i

Komencaj sonoj:

por demandi	K	k-i
por montri	T	t-i
por ĝeneraligi	Ĉ	ĉ-i
por nei	NEN	nen-i

Finaĵoj:

persono, individua objekto	U:i-u, k-j-u, ktp.
objekto, okazo	O:i-o, k-i-o, ...
kvalito	A:i-a, k-i-a, ...
loko	E:i-e, k-i-e, ...
tempo	AM:i-am k-i-am, ...
kvanto	OM:i-om, k-i-om, ...
maniero	EL:i-el, k-i-el, ...
kaŭzo	AL:i-al, k-i-al, ...
posedo	ES:i-es, k-i-es, ...



Por demandi pri persono ni formas vorton tiel : K - I - U = kiu

Por montri lokon : T - I - E = tie.

De la korelativaj vortoj ni povas formi ankaŭ diversajn gramatikajn kategoriojn (substantivojn, adjektivojn k. c.): kiea (de kiu loko), tiea (tiuloka, de tiu loko), ĉi-tiea, kiam (kiutempa, de kiu tempo), la tiamaj esperantistoj (la esperantistoj de tiu tempo, de tiu epoko), ĉiama, kioma (kioma horo estas?), iome, iomete, kialo (kaŭzo: kio estas la kialo de tiu evento?).

Atentindaj kombinoj: kelkiu, kelkiam.

NOTO. — Por rekapitulaci la materion pri la korelativaj vortoj, la instruanto povas doni ilin ankaŭ tabele. Krome estas ankaŭ ilustraĵo, kiu ilin prezentas bilde.

IOM = ia kvanto (nedifinita kvanto): ĝia signifo estas *nemulta kvanto*: iom da mono, iom da pano, post iom da tempo, ankoraŭ iom da pacienco.

Kioma: kioma estas la horo? Ioma: post ioma tempo (post iom da tempo, post nelonga tempo). Iomete = malmulte: iomete da pano; ankoraŭ iomete.

ajn: Kiu ajn, iu ajn, ĉiu ajn.

Kiu ajn skribus la leteron, ĝi devas esti legebla kaj komprenebla.

Skribu la leteron iu ajn (ne estas grave kiu konkrete ĝin skribu, estas tute egale kiu ĝin skribos).

Ĉiu ajn povos skribi tian leteron.

NOTO. Ĉe **iu ajn**, **ĉiu ajn** la aldono de **ajn** nur emfazas, plifortigas la penson, ke ne estas grave kiu konkrete farus la agon (aŭ estus en la stato); oni povus en tiuj kazoj uzi ankaŭ la simplajn **iu** kaj **ĉiu**, sed la **ajneco** ne estus akcentata.

Kiu ajn estas uzata plej nature kiel *relativa pronomo*.

La samo validas ankaŭ pri la uzo de **ajn** kun: Kiam (iam, ĉiam), ie, iel, iom ktp. AJNA = iu ajn, ia ajn (sen difinita individueco aŭ kvalito).

NOTINDAJ VORTUZOJ.

NEK estas uzata kiam estas *pli ol unu* neo: nek mi, nek vi; nek en nia domo, nek en la via; vi nek legas, nek skribas; mi ne vidis ŝin, nek ŝian fratinon. Por unuopa neo estas uzata nur *ne*, ofte en akompano de *eĉ* (por pli forta neo): Mi eĉ ne scias tion. Eĉ unu homo ne venis. Ne pasis eĉ unu horo kaj li alportis la libron.

Lipharo — haro(j) kiu(j) estas (kreskas) sur lipo.

Priskribi — skribi pri io, rakonti sisteme pri io. Mi priskribas nian urbon. Priskribu la ekskurson! Priskribu de la urbo. Priskribu de la ekskurso.

Legitimilo — karto, dokumento, per kiu persono povas legitimi sin, aserti, pruvi kiu li estas.

Iam — iufoje. *Iam* ofte estas uzata por esprimi nedifinitan tempon en la pasinteco; tiel, ordinaro, oni komencas infanajn fabelojn: iam vivis reĝo kaj reĝino. En sia vasta senco: *iam* = iufoje — en iu momento.

Mi permesas al mi — vi permesas al vi — li permesas al si (faru diferencon inter „li permesas al si“ = al si mem, kaj „li permesas al li“ — al iu alia persono). Mi permesas al mi peti de vi servon. Mi permesas al mi prezenti al vi mian amikon. Permesu al mi prezenti al vi mian amikon. Mi prezentas al mi kiom li ĝojos pro tio.

EKZERCOJ.

1. KIES	domo estas	alta?	... estas alta.
	kostumo	nigra?	
	okuloj	bluaj?	
	vizaĝo	bela?	

2. I... venas al ni.

I... mi loĝis en Parizo.

Mi ne trovas i... interesan en la rakonto.

Se vi vidis i... mian fraton, diru al li, ke mi atendas lin.

Se vi trovos i... eraron en mia letero, montru ĝin al mi.

3. Uzu *nek* aŭ *eĉ ne* (kie konvenas) en la sekvantaj proponoj:

Li havas... monon, ... panon.

Ii... havas panon por manĝi.

Morgaŭ ŝi ne povos veni, ... ŝia fratino.

Mi... mangos, ... trinkos.

Li... intencas pagi.



La partoprenintoj en la plenkunsido de CK
de BEA okazinta la 25-an de marto 1962

Mladen Isaev

BULGARIO

Pasinton vian rememoras mi,
malĝojon vian — en rigard',
kaj jam la nom' de Bulgari'
denove sonas nun kun ard'.
Ĝi sonas en la voĉ' de l' filoj,
en praarbaroj de l' jarcent',
en la riveroj,
en la tempestoj,
en bru' de l'maro,
kaj en profundo de l' silent'.
Sub fajra sun' la humo spiras,
ekfumas ĝi en randa sfer',
la homo per plugil' inspire
poemojn skribas sur la ter'.

Sproninte ŝtalĉevalojn, Bulgario,
vi marŝas firme al la lum'
kaj la Balkan' en helaj brilradioj,
potencajn ŝultrojn levas nun.
Rigardon fiksas vi rigoran
al montoj Stranĝa,
Eltepé,
aereskadroj kie gloraj
defendas vin en vigla pret'.
Samkiel verdarbaro monta
susuras mond' de ĝoj' kaj flam',
por vi generaci' estonta
belajojn novajn kreos jam.

Tradukis: At. Lakov

Sergo Novik

KANTO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ

1. EK-ZIS-TAS MUL-TAJ LIN-GVOJ EN LA MON-DO, SED NUR AL U-NU

1. LI-GAS NIN LA KOR' -, ĜI BON-VE-NI-GAS AL A-MI-KA RON-DO

1. DE MIS-KOM-PREN' NU-LI-GAS MU-ROJN FOR -, ĜI BON-VE-

1. NI-GAS AL A-MI-KA RON-DO -, DE MIS-KOM-PREN' NU-

1. LI-GAS MU-ROJN FOR -, 4. PAC' EN ĈI-U DOM. -.

Ekzistas multaj lingvoj en la mondo,
sed nur al unu ligas nin la kor'.
Ĝi bonvenigas al amika rondo,
de miskompren' nuligas murojn for. (2)

Kun ĝi ni paŝos tra la tero tuta,
salutos kontinentojn per leter',
ĉar jam ne plu ni estas kvazaŭ mutaj,
ni ĉie sentas nin en hejma sfer'. (2)

Ĝi estas nia lingvo Esperanto,
al la gepatra lingvo kara frat',
armilo de pacama batalanto
kontraŭ militeksplodo, atombat'. (2)

Per juna kor' soifas ni la pacon,
kunvivon aman inter ĉiu hom'.
Ni servopretas nian idealon,
ke regu Am' kaj Pac' en ĉiu dom'. (2)



18-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
DE TEJO EN SVEDIO

La 18-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en IŜTAD, Svedio dum la semajno tuj post la Unversala Kongreso en Kopenhago, do de la 12-a ĝis la 18-a de aŭgusto. Iŝtad estas havenurbo kun proksimume 13 000 enloĝantoj en la plej suda sveda provinco Skanio. La urbo situas ĉe la Baltiko, havas grandan sablostrandon kaj famas ankaŭ kiel libertempa loko. En la programo de la kongreso estas la kutimaj eroj kiel ekz. interamikiĝa vespero, kongresa balo, jarkunveno de TEJO, prelegoj, oratora konkurso, ekskursoj, -enkontiĝo kun lokaj junularorganizoj ktp.

ESPERANTO EN
PEKINA FREMDLINGVA KOLEGIO

La Pekina Fremdlingva Kolegio estas unu el la ŝtataj altlernejoj, kiuj edukas instruistojn de diversaj fremdaj lingvoj. Ekde la kuranta lernojaro ankaŭ Esperanto estas envicigita en

la lernobjektojn de tiu ĉi kolegio. Ĝi estas instruata kiel dua fremda lingvo al studentoj kiuj ĝin elektis, kaj la kurso daŭros du jarojn.

ESPERANTO — OFICIALA LINGVO EN
KONFERENCIO DE SCIENCISTOJ

Sub la aŭspicioj kaj en la kadro de la 47-a Univesala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto, la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco. En la konferenco partoprenos kvalifikitaj sciencistoj, ĉu persone ĉu per skriba kontribuo. La oficiala lingvo uzata estos Esperanto.

ANKAŬ EN AŬSTRIA LERNEJO
ESPERANTO ESTAS INSTRUATA

La Aŭstria Esperanto-Federacio informas ke estas organizitaj du oficialaj Esperanto-kursoj por gelnantoj el la ĉeflernejoj de Grac. Esperanto estas instruata kiel nedeviga lernobjekto dum du horoj semajne. La gelnantoj ne pagas la instruadon, ĉar la honorariojn pagas la ĉefa lernejo-instituto de Grac.

Plue la Aŭstria Ministerio por Instruado decidis doni subvencion de 1000 ŝilingoj al la Aŭstria Esperanto-Federacio.

ORGANIZA VIVO

JARKUNVENOJ DE LA SOCIETOJ

SLIVEN. La 10-an de marto okazis la jarkunveno de la loka Esp.-societo. La kunveno elektis novan estraron kun agema prezidanto — ing. Ĉ. Kantargiev kaj sekretario — V. Boneva, juna oficistino. La unua ĉi-jara iniciato de la societo estis la publika prelego de juna esperantisto el Burgas — A. Calakov, kiu klare kaj koncize raportis pri la deveno, signifo kaj estonteco de la internacia lingvo. La ĉeestantoj starigis interalie ankaŭ la demandojn pri malfermo de Esperanto-fakultato ĉe la Universitato, kiu preparu instruistojn pri la internacia lingvo.

Ing. Ĉ. Kantargiev

RUSE. La jarkunveno de la urba societo „Libero“ okazis la 2-an de marto. Ĉeestis la kunvenon ankaŭ reprezentanto de la urba komitato de la Partio — k-do Ivanov. Li atentigis la esperantistojn pri la antaŭstarantaj taskoj: por lingva perfektigo, por plibonigo de la internacia korespondado, por ĉiam pli aktiva partopreno en laboro por ekonomia prosperigo de nia lando. Li same promesis ĉiaspecan helpon, interalie ankaŭ por akiro de pli grandan kaj konvenan klubojn en la centro, kiu pli efike imponu antaŭ la geurbanoj kaj la eksterlandanoj, traveturantaj nian urbon.

B. Kavalĝiev

ZIMNICA. La 6-an de marto k. j. en vilaĝo Zimnica, distrikto de Jambol, okazis kunveno por restarigo de la esperantista societo. La kunvenon malfermis k-do D. Martinov — sekretario de la komunuma komitato de BKP. Li parolis pri la signifo de la internacia lingvo kiel rimedo por internacia interŝanĝo de kulturaj valoroj kaj por la porpaca batalo. K-do D. Trudoljubov — prezidanto de la societo en Jambol parolis pri la estontaj taskoj de la renovigita societo. La societo havas 27 membrojn, precipe gejunulojn. La kunveno elektis estraron de la societo, fiksitis ĝian nomon — „Amikeco“ kaj decidis tuj malfermi kurson.

Marinka Koleva

ST. DIMITROV. Dum februaro en la antaŭbalotaj tagoj okazis kunveno-renkonto kun la kandidato por deputito en nia urbo — k-dino Roza Koritarova — sekretario de la profesiaj unuiĝoj en nia lando. Ĉeestis ankaŭ la unua sekretario de la urba komitato — k-do Iv. Kostadinov kaj la dua sekretario — G. Mateev. En la nomo de la esperantista societo prenis la vorton k-do Iv. Dobrovski, kiu tralegis specialan leteron okaze de la balotoj kaj deklaris la pretecon de la esperantistoj kune kun nia tuta popolo labori por la ekonomia prospero de la lando, batali por paco en la mondo. Oni petis k-dinon Koritarova ankaŭ helpi la esperantistan movadon kaj rekomendi al la laboristoj lerni la internacian lingvon. Ĉe la transdono de la letero oni aplaudis sincere. K-dino

R. Koritarova salutis k-don Dobrovski kaj promesis helpi nin.

En la ministra urbeto Bobov-Dol daŭras kurso por komencantoj gvidata de nia fervora prezidanto B. Drenski. 25 partoprenantoj lernas diligente.

IV. Dobrovski

JAMBOL. Antaŭ nelonge en la popola teatro en Jambol estis organizita kurso de Esperanto, gvidata de la longjara esperantisto G. Vajarov — direktoro de la teatro. Plej bone laboras kaj rapide progresas la aktoroj Cv. Eneva, An. Savinova, V. Asenova, la aktoro G. Svinarov kaj aliaj. La geaktoroj-esperantistoj preparas specialan literaturan programon, kiun ili prezentos en la 35-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Burgas.

Dimo Trudoljubov

EN INTIMA ATMOSFERO

Jarkunveno de la poŝtista societo „Heroldo“ en Sofio. Kvardeko da personoj aŭskultas kun atento la faktoplenan raporton de la estraro, legatan de la prezidantino Vera Nikolova. Krom la kursa kaj propaganda laboro — multaj ekskursoj kaj amuzoj. La rezulto estas la intimeo, kaj amikeco inter la membroj. La postsekvo — riĉa rikolto. Tio donis sian signon ankaŭ al la kunveno: la diskutoj estas viglaj, liberaj, senĝenaj. Oni sentas sin en familia rondo. Impresas la amasa partopreno en la diskutoj fare de la virinoj (kontraŭe al la kunvenoj de la alia Sofia societo „M. Gorkij“). La kritiko estas konkreta kaj impulsiga.

La prezidanto deklaras post la kunveno — amuzon. Akordiono ekludas. Dancoj, kantoj, ŝercoj. Programo improviziita, sed bela kaj entuziasmiga. Ĉarma esperantistino rigalas per dolĉaj bombonoj. La poŝtejoj samideanoj montriĝis kiel majstroj de intima atmosfero. En tio sin kaŝas la sukceso.

Bonan vojon, karaj geamikoj — heroldanoj!

JUNULARA ESPERANTISTA VIVO EN VRACA

Antaŭ nelonge la junulara grupo „Ĥr. Botev“ ĉe Esperanto-societo „Sukceso“ en Vraca jarkunvenis. La junuloj en Vraca kaj precipe la lernantoj en la teksa faklerneja disvolvas varian agadon. Ili regule organizas ekskursoj, kulturklerigajn kunvenojn k. s. Unu klaso lernas Esperanton en la oficiala lernoprogramo. La junuloj organizis specialan kunvenon okaze de la Virina Tago, la 8-a de marto. Post la raporto, kiun legis la instruisto E. Daskalov la esperantista kantgrupo plenumis varian programon. La vespero finiĝis per dancoj.

EFIKA KUNLABORO DE TURISTOJ KAJ ESPERANTISTOJ

La turista sekcio en la ekonomia teknikumo „V. Levski“ en Plovdiv jam varbis kiel anoj

ĉiujn gelernantojn kaj geinstruistojn. Bone progresas ankaŭ la esperantista grupo en la teknikumo. La 24-an de marto okaze de la antaŭstaranta kongreso de la instruistaro kaj la VIII Kongreso de BKP, ambaŭ organizaĵoj per komunaj fortoj organizis Esperanto-turistan vesperon.

Ĉeestis la invititaj reprezentantoj de la urba Esp.-societo „Kulturo“, de la turista societo „Ruen“, de la alpinista klubo kaj de la distrikta turista stacio en Plovdiv.

Lernantino, flue parolanta Esperanton, raportis pri la signifo de la internacia lingvo kaj speciale substrekis la eblecojn por ĝia aplikado en la agado de la turistaj sekcioj kaj por pli larĝa propagando de la turistaj objektoj vizitindaj de alilandaj turistoj.

Estis tre agrable aŭskulti kompletan programon de kantoj, deklamaĵoj kaj klarigoj nur en Esperanto fare de la lernantoj de IV d^a kurso, kiu amase partoprenis la ĉi-jaran Esperanto-kurson ĉe la teknikumo. Estis arangita ankaŭ interesa ekspozicio de leteroj, revuoj, libroj kaj multaj aliaj objektoj ricevitaj el alilando.

P. P.

HONORE AL LA VIRINOJ

Okaze de la internacia tago de la virinoj 8-a de marto la esperantistoj de societo „D. Sasonov“ en Asenovgrad, la 4-an de marto, dimanĉe post tagmezo organizis specialan renkontiĝon. Ĉeestis pli ol 30 personoj kies plimulto kompreneble estis virinoj. Por tiu ĉi celo oni preparis raporton en kiu kamaradino Zlatka Toĉeva en bona Esperanto klare montris la batalvojojn de la virinoj en la tuta mondo por akiri de egalrajto kaj speciale por la nuna ĉefa tasko, ke ni batalu kontraŭ la militbruligantoj. En ĝi ŝi ankaŭ menciis, ke la esperantistinoj en Asenovgrad same kiel iliaj fratinoj el la tuta mondo firme staras sur lafronto de paco, kaj tion ili plej bone esprimas plenumante sian ĉiutagan laborplanon, kie ajn oni laboras.

Post tio oni kantis esperantajn kaj bulgarajn popolkantojn, deklamis, ŝercis kaj babilis. La virinoj de la societo same estis prizorgintajrigali siajn gastojn. En tre bona amikeca atmosfero la esperantistaro de Asenovgrad daŭrigis tiun ĉi belan kaj amuzan arangon dum pli ol tri horoj.

Jen okazoj kiujn ni devas utiligi dum la vintra sezono, tiam kiam estas maloportune ekskursi. La festeto certe povis esti pli sukcesinta, se estus venintaj pli multe da geesperantistoj. Sed ni estas certaj, ke ili post kiam ekscios ke la ĉeestintoj pasigis kelkajn neforgeseblajn horojn en esperantista kaj amikeca atmosfero bedaŭros. Kaj por estonte je similaj arangoj ili estos la unuaj ĉeestantoj.

Ni laboras kaj serĉas novajn kaj pli taŭgajn formojn por kiuj ni atingos pli bonajn rezultojn por nia kara esperanto-movado kaj per ĝi por la tutmonda paco kaj amikeco.

At. Gaev



Ni, la virinoj-membroj de Esperanto societo „David Sasonov“ en Asenovgrad, kunvenintaj je antaŭfesta kunveno, okaze de la Tago de la Virino — 8-an de marto, sendas al vi niajn plej varmajn salutojn kaj bondezirojn por bonfarto, ĝoja kaj trankvila vivo, plensukceso de viaj deziroj kaj laboroj.

Ni, la virinoj de nia lando, kiuj havas egalvalorajn rajtojn kun la viroj, ŝultre-al-ŝultre kun ili kaj la tuta nia laborema kaj pacama bulgara popolo vigle agadas por efektivigo de la konstruo de nia belega nova socialisma vivo.

Ni malŝatas la militojn kaj la militbruligantojn. Per plenumado de niaj ŝtataj socialismaj jarplanoj, ni fakte batalas kontraŭ la militoj, por paca vivo en nia kara lando kaj en la tuta mondo.

Do, ni apelacias al vi: donu al ni viajn manojn; ni kune batalu por ke ne plu estu militoj kaj militbruligantoj. Ĉiuj disputaj aferoj estu aranĝotaj per pacaj rimedoj, sed ne per militoj.

Per komunaj prizorgoj kaj bataloj de ĉiuj virinoj kaj patrinoj, al kiuj estas kara la paco, ni venku la militon, savu la pacon kaj ni ne permesu al militbruligantoj denove ĵeti la homaron en nova plejterura atom-nuklea milito. Ni ne permesu, ke niaj karegaj infanoj estiĝi viktimoj de la milito.

Karaj amikinoj, ni volas starigi kun vi reciprokajn rilatojn, interŝanĝi propagandajn materialojn, sperton pri via poresperanta kaj porpaca agado, ni volas scii pri la partopreno de virinoj en la socia vivo kaj pri ĉiuj aliaj problemoj, kiuj estus utilaj por la pacamanta homaro.

Vivu nia tutmonda tago de la virinoj — 8-a de marto.

Vivu la tutmonda paco kaj amikeco.

Vivu nia kara lingvo — Esperanto.

Per Esperanto por mondopaco.

Komisiita por la virinoj:

Zlatka Točeva

GRAVA KOREKTO

En n-ro 1 de la k. j. en la tabelo de la rezultoj de la dua etapo de la organiza konkurado 1961/62 estas allasitaj kelkaj eraroj, kiujn ni ĉi sube korektas:

Loko kaj nomo de la societo	membroj	abonintoj	% plenumo
Dimitrovgrad — „Flamo“	74	68	205,9
Burgas — „Nigra Maro“	106	91	128,9
Jambol — „Maksim Gorkij“	106	25	132,1
Dimitrovgrad — „Internacia Amikeco“	70	10	52,9
Pernik — „Nova Vojo“	24	24	100

Konklude:

Dimitrovgrad — „Flamo“ okupas la unuan lokon en la dua etapo.

Stara zagora — „Verda Stelo“ okupas la duan lokon.

Jambol — „M. Gorkij“ okupas la trian lokon.

Ruse — „La Ponto de la Amikeco“ okupas la kvaran lokon.

Burgas — „Nigra Maro“ okupas la kvinan lokon.

Pernik — „La Nova Vojo“ okupas la 18-an lokon post „Pârvomaj“.

Dimitrovgrad — „Internacia Amikeco“ eliras el la tabelo.

Organiza Fakto de CK de BEA

DEZIRAS KORESPONDI

USSR

Rostislav Kristić (inĝeniero de elektrostacio, 38-jara), Boremec, Mlinovski rajon, Rovinskaja obl., Ukrainio — kun ĝejnuloj el Francio, Italio, Germanio, Pollando kaj Svedio; PL, il.

Viktor S. Nebogatov, do vostrebovanija, Glavpočtam, Ĉernigov — kun ĉi pri ĉi, precipe pri kinoarto kaj pacmovado.

Orest Branec (vickursgvidanto), Esperantorondo, Dvorec Kultury, Krasnograd (Ljovovskaja obl.), Ukrainio; 70 gekursanoj — kun ĉi kaj interŝ. PL, PM, muziknotojn, nacilingvajn gaz. pri teatro kaj kinoarto. Karaj esperantistoj el la tuta mondo kaj Sovet-Unio, bonvolu sendi materialojn el gazetoj kaj prospektoj pri la unuaj kosmonaŭtoj Jurij Gagarin kaj Herman Titov.

Vladimir Levkovskij, ul. 1 Maja 1, kv. 25, p. Sosnovka, Zabuhskij rajon, Ljovovskaja obl. Ukrainio.

Nikolaj Ivanoviĉ Maslov (vickursgvidanto de E-rondo, instruisto de fremdaj lingvoj), ul. Krivonosa 10, kv. 14, p. Sosnovka (Zabuhskij rajon, Ljovovskaja obl.), Ukrainio — kun seriozaj korespondantoj el Eŭropo; gaz. pri pedagogio, teatro, kinoarto, PL, PM; dez. ricevi naciajn himnojn de la respublikoj de Sovet-Unio kaj la tuta mondo; interŝ. PL kun sovetaj e-istoj.

Gene Ĉerniauskaite (lernantino, 16-jara), str. Sodu 84—3, Kaunas 2, Litovio — kun ĉi, PL, insignoj, fotoj de kinoaktoroj.

T. R. Linntamm (15-jara), Heina 11, Rakvere, Estonio — kun Norvegio, Usono, Germanio-DDR, Greklando kaj la novaj ŝtatoj en Afriko.

VJETNAMIO

Hô-xuân-Nhi, Kap phâm 1, 28 str. Nguyễn-Siễn, Hanoi — kun laboristoj kaj lernantoj el Eŭropo.

K-do Khanh, 98 Nguyễn-Du, Nanoi — dez. ricevi en 1962 „Heroldo de Esperanto“, „Esperanto“ de UEA, fotojn el la E-vivo kontraŭ „Vietnamio antaŭenmarŝas“, „Paco“, gaz. kaj vietnamaj E-libroj. Li ne kolektas alumetetiketojn kaj PM, sed povas sendi ilin kaj belajn bildojn el Vietnamio.

D. c. Ng. D. Khanh, Cuc Qux-Hoach Dô Thi (Nhom Nghiên-Cuu Quôc Te Ngu dê), Bô Kiên Truc. Konekse kun malfermo de E-kurso kaj fondo de E-grupo ni petas samideanojn (arkitektojn, inĝenierojn, teknistojn el ĉi) sendi salutleterojn kaj E-aĵojn.

BELGIO

M. Schyns, 144 blv. Gen ral Jacques, Ixelles

HUNGARIO

Pal Fabulia Lövház n. 32. II. 2, Budapest II — kun papiliokolektantoj el ĉi.

BULGARIO

Veska Petrova Hristova, Klimatična gimnazia, Kalofer — kun ĉi per il. PK.

Rumen Stojanov, selo Draganovo, Târnovsko — kun ĉi pri ĉi, precipe PM, PK, pri literaturo, artistportretoj, karikaturaj.

ĈEHOSLOVAKIO

Karel Hájek, Ĉeske Budějovice, Kněžskodvorská ul. 11—dez. interŝ. PK, esperantajjn, belajn gazetojn. Serĉas nur seriozajn gekorespondantojn.

Abonu al

„INTERNACIA JURNALISTO“

*organo de Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio!
Sendu tuj 1 levon al BEA, p. κ. 66, Sofio! Aboniĝu
viajn amikojn kaj korespondantojn!*

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAJEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktorc), Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Vasilka Petrova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 7-46-01

DIP „GENGAZ“

Sofio, bul. Válcó Ivanov, 114. Telegramoj: Gengaz


PRODUKTAS

Benzinajn elektro-agregatojn BE 3 kun povo de 3,75 kv.

Benzinajn elektro-agregatojn DE 16 kun povo de 20 kv.

Eenzinajn elektro-agregatojn DE 30 kun povo de 38 kv.

Por tensio 231/400 moveblaj kaj fiksitaj.



EKSFORTANTO — „ELEKTROIMPEKS“, SOFIO